

William Wordsworth,  
The Daffodils

I wander'd lonely as a cloud  
That floats on high o'er vales and hills,  
When all at once I saw a crowd,  
A host of golden daffodils,  
Beside the lake, beneath the trees  
Fluttering and dancing in the breeze.

Continuous as the stars that shine  
And twinkle on the milky way,  
They stretch'd in never-ending line  
Along the margin of a bay:  
Ten thousand saw I at a glance  
Tossing their heads in sprightly dance.

The waves beside them danced, but they  
Out-did the sparkling waves in glee: -  
A poet could not but be gay  
In such a jocund company:  
I gazed - and gazed - but little thought  
What wealth the show to me had brought.

For oft, when on my couch I lie  
In vacant or in pensive mood,  
They flash upon that inward eye  
Which is the bliss of solitude;  
And then my heart with pleasure fills  
And dances with the daffodils.

...

William Wordsworth,  
La narcisoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Migrante super mont' kaj val'  
samkiel nubo ĉe l' ĉiel',  
subite mi ekvenis al  
narcisa kamp' kun ora bel',  
jen apud lago, ĉe arbar'  
en briz' ondanta kiel mar'.

Seninterrompe kiel la  
stelaroj de la galaksi'  
etendis plurdekmiloj da  
ĉi tiuj floroj en lini'  
laŭlonge de l' lagbordo sin,  
en longaj vicoj kaj sen fin'.

La ondoj dancis, la brilet'  
de l' floroj min impresis pli;  
ja devas ĝoji la poet'  
en tia ĉarma kompani'.  
Rigardis kaj rigardis mi  
kaj min riĉigis tio ĉi.

Ĉar ofte, kiam kuŝas mi  
trankvile sur la sofo re-  
aperas tiu bildo ĉi,  
kaj tiam reokazas, ke  
ekĝojas mia kor' en mi,  
kun la narcisoj dancas ĝi.

...

William Wordsworth,  
Dafodiloj

*tradukita de Krysz Ungar*

Mi vagis sola kiel nub'  
Altflosas super la kampar'  
Kaj tiam tuj aperis trup'  
De dafodiloj; ora ar'  
Apud la lag', sub arba tend'  
Flirtis kaj dancis en la vent'.

Senbreĉe kiel astra bril'  
Sur Lakta Voj' flagretas, jen  
Sterniĝis ili en defil'  
Senfine laŭ la laghaven'.  
Rigardon kaptis la balanc'  
De dekmil kapoj en la danc'.

Apudaj ondoj dancis, sed  
Triumfon gajnis floroj ĉi,  
Devigis gajon de poet'  
Plej joviala kompani':  
Mi rigardadis sen atent',  
Ke min riĉigos la prezent'.

Ĉar ofte, kiam kuŝas mi  
Penseme, aŭ en menslangvor',  
Ekfulmas ili tra l' konsci' -  
La beno de solema hor';  
La koro pro pleniga ĝu'  
Kun dafodiloj dancas plu.

...

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas WILLIAM WORDSWORTH (\*1770 – †1850).*

*Arg-39-73 (2003-10-17 22:02:21)*

*Origina anglalingva teksto de WILLIAM WORDSWORTH (1770 - 1850)*

*Traduko de la Angla poemo “The Daffodils” de WILLIAM WORDSWORTH (\*1770 – †1850) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1997-03.12.*

*Arg-39-74 (2014-09-02 14:14:50)*

*Verkita de la poeto Vordzvorto, Vilhelmo (1770 - 1850). Esperantigis: Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff) en 1997-03-09 laŭ la origina anglalingva teksto.*

*Traduko de la Angla poemo “The Daffodils” de WILLIAM WORDSWORTH (\*1770 – †1850) en Esperanton de KRYS UNGAR (Krys Bottrill).*

*Arg-39-632 (2009-09-20 15:01:36)*